

aperis la unua numero de la Tria Periodo de »Literatura Mondo«, kaj sur ties unua paĝo Kalocsay, resumante la pasintaĵon kaj planante la estontecon de la revuo, akcentis la vakuon, kiun lasis la morto de Vilmos Bleier: »Ĉu entute estos eble efektiviĝi liajn vastajn projektojn sen lia granda agemo, kapablo kaj entuziasmo?« Feliĉe fortike staris plu la ĉefoj el la malnova gvardio, Kalocsay, Szilàgyi, Tàrkony (la iama Totsche) kaj Baghy; feliĉe Bela Blier prenis sur sin la taskon de la mortinta frato, kaj la nova etapo tiam ŝajnis promesplena... Oni scias, kiel la glaciigo de la internaciaj rilatoj malpermesis en Aŭgusto 49 pluan ekzistadon de tia internacia renkontejo, kia estis »Literatura Mondo«; sed dum tiu mallonga tempo regule aperadis 16 duoblaj numeroj, kun 512 paĝoj samformataj, kvankam ne ilustritaj, kaj la abonantoj eĉ plimultiĝis, atigante 600 en la jaro 48.

Dispoleniĝo de la skolo

Se la dua periodo de »Literatura Mondo« estis la tempo de la florado, la tria fariĝis kvazaŭ la sezono de la dispoleniĝado. Sajnas, ke prepariĝis jam la formiĝo de la novaj grupoj, kiuj, ĉiu kun sia regiona karaktero, certigos la pluecon de la kolektiva enterpreno. Jam el inter la novaj kunlaborantoj oni ekvidas la estontajn kolonojn de la grupo skota (Reto Rossetti, William Auld, John Dinwoodie), de la ĉeĥo-slovaka (Karolo Piĉ, Tomaŝ Pumpr), de la skandinava (Poul Thorsen) de la jugoslava (Boĵidar Vanĉik), ĉirkaŭ kiuj kunvenos poste tiom da junaj talentoj. Tiele, post kiam ĉiuj konvinkiĝis, ke la silentiĝo de »Literatura Mondo« estas definitiva, povas diversloke aperi novaj junaj revuoj, kiuj aspiras anstataŭi la gloran malaperintan — kaj mi estus la lasta, kiu volus eĉ iomete depreni el iliaj meritoj kaj atingoj. Tamen en mia maljuna koro neniuj el ili povas iam teni la lokon de la patrina revuo, kiu instruis al ni ĉiuj, kio povas kaj devas esti la Esperanta literaturo, kaj sur kies paĝoj ni lernis la arton kunplekti kaj kantigi la Ĝesperantajn vortojn. Kaj, se per tiu ĉi tro klare malperfekta provo mi ne sukcesis fari la historion de la Hungara Skolo, almenaŭ mi plenumis mian intencon, montri omaĝan dankon al tiu skolo, kiu en la prozo de Baghy, de Szilàgyi kaj de Bodó, en la poezio de Kalocsay, de Baghy kaj de Tàrkony donis al ni ĉiam imitindajn modelojn de pura lingvo kaj de alta stilo.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 18. n-ro 1 (1967)

003.344 (091)

HISTORIO DE LATINA ALFABETO

(Josef Chvosta, Ĉeĥoslovakio)

Sen ĉiaj ajn diskutoj la invento de la skribarto apartenas al la plej grandaj sukcesoj de la homara kulturo. Oni nepre ne kapablas imagi la evoluon de la homara civilizado sen literaro. Nur la literaro ebligas konservi kulturon por posteuloj kaj nacioj, kiuj ne venis al kono de la skribarto aŭ kiuj ne ellernis ĝin de ceteraj pli kulturaj nacioj, malaperis en la historio tiel, ke oni eĉ ne konas iliajn nomojn. La literaro ja signifas ankaŭ la komencon de la fakta historio, ĉar pri pli fruaj historiaj agoj povas atesti, sed certe ne tiel perfekte kiel skribita postrestaĵo, nur arkeologia objekto. La literaro estas noto de parolo, ĝi estas konservado de aliel momenta ideo, ĝi ebligas konservi la frazojn, kiuj iam estis elparolitaj kaj kiuj aliokaze povas esti nur neprecize memorataj. Per literaro oni povas pli facile komuniki kaj transdoni ideojn, instruojn kaj sciencojn. La literaro kreis ankaŭ naciojn el unuopaj triboj, konstantigis la lingvon, kiu aliel ŝanĝiĝus tre rapide ja la literaro ebligis al la nuntempo eĉ konon pri lingvoj, kiuj jam antaŭ longe ĉesis esti parolataj.

Ekesto de literaro

La literaro ne ekestis subite, ne estis ia donaco de dioj, eĉ se la mitologio parolas pri tio. Sed la literaro trairis longan evoluon el interkonsentitaj signoj, kiuj nur helpis kaj subtenis la memoron, ĝis nuntempaj statoj. Unue aperadis piktografoj aŭ petroglifoj, kiuj estis »skribitaj« sur diversaj materialoj kaj kiuj estis notoj de posedado, subtenis la memoron pri certaj memorendaj ideoj kaj servis por primitivaj, simplaj komunikoj en amaferoj, en ĉasado, pri magiaj formuloj, pri militoj, konfliktoj kaj aliaj okazaĵoj de tiama homa socio. Tial ĉiuj literalsistemoj estas en la unua etapo bildetoj, sed tiuj bildetoj estas pro manko de artisma talento, pro malperfekteco de materialo

kaj skribiloj simpligataj, ĝis oni perdas tujan rilaton inter bildeto kaj objekto. La bildeto ja iĝas signo kaj oni devas lerni la signifon de unuopaj singoj. Kiam el tiuj signoj iĝas sistemo, tiam oni povas paroli pri ekesto de la literaro. La unuaj liter sistemoj konataj al la nuntempa historio ekestis eble antaŭ ses mil jaroj en nuna Egiptujo aŭ en Babilonio. La sciencistoj ankoraŭ ne scias precize, ĉu primareco estas en Egiptio aŭ en Babilonio. Sed en Egiptujo estas hieroglifoj, kiujn malnovaj Egiptoj skribis ĉie, sur vandoj de piramidoj, de tomboj, sur tolo kaj sur papiruso. Komprenoble ĝis nuna tempo konserviĝis precipe surskriboj sur vandoj, kontraŭe la alia materialo konserviĝis nur en tre malgrandaj kvantoj. En tiu kazo la skribaj tekstoj el Babilonio estas konservitaj en pli grandaj kvantoj, ĉar ili estas skribitaj sur brikoj el bakita argilo, do sur materialo, kiu povis dum longa tempo rezisti neniigon. Sur tiuj brikoj estas la konata kojna skribo. Sed ambaŭ liter sistemoj estas bildaj, unuopa signo estas signo por unu vorto, ja eĉ por la tuta frazo. Oni diras, ke oni povas legi tiun ĉi literaron sen kono de la koncerna lingvo, sed tiel facile tio ja ne estas.

La skribarto estis komence monopolo de pastroj, kiuj zorgeme elektis siajn instruotojn. Ser per evoluo de la homara kulturo la neceso de skribarto venis eĉ al aliaj homoj, por kiuj ja ne estis eble memori la grandan nombron da signoj, kiun bezonas la vorta literaro, tio estas literaro, en kiu ĉiu litero signifas la tutan vorton. Eĉ se oni povis memori kelkajn signojn, ĉar ili ja estis bildetoj, tamen signoj por abstraktaj ideoj ne estis plu tiom memoreblaj. Kaj tial oni komencas vidi en literoj signojn de sonoj. Unue oni havis signojn por unuopaj silaboj, oni inventis silaban literaron.

Tio jam estis progreso, ĉar la nombro da silaboj neniam egalas la nombron da vortoj. Signoj por unuopaj sonoj ekestis tiamaniere, ke oni akcentigis el la vorto, kies bildo la litero estis, akcentan silabon, respektive tiu vorto estis nur unusilaba. Sed tiamaniere la literaro kuniĝis pli tuŝe al la lingvo kaj iĝis fakta literaro. La liter sistemo ne estis plu bildetoj, respektive la signoj neniel almemorigis koncernajn bildetojn, precipe se la literaron transprenis alia nacio, kies lingvo estis diferenca.

La unuaj alfabetoj

La plua evoluo estas etapo, kiam per unu litero estas signita nur unu sono, konsonanto, ĉar la vokaloj ne estis en lingvoj, kie la literaro ekestis, tiel gravaj. Tiu ĉi literarsistemo estas plej perfekta, ĉar la nombro da literoj povas esti nur malgranda, la skrib kaj legarton povas ĉiu ajn ellerni. Sed nek en Egiptujo nek en Babilonio

oni venis ĝis la literaroj por unuopaj sonoj. En Babilonio restis la silaba liter sistemo, en Egiptujo estis post hieroglifoj hieratika liter sistemo kaj fine demotika liter sistemo, kiu jam estis preskaŭ perfekta, nur kelkaj literoj havis diversajn validojn, sed kiel inventintoj de la sona liter sistemo estas maristaj kaj komercistaj Fenikoj, kiuj pli perfektigis la demotikan liter sistemon kaj fiksis siajn signojn, kiuj poste rapide disvastiĝis. De Fenikoj devenas ankaŭ la nomo »alfabeto«, la unua litero A, almemorigas ankoraŭ la kapon de virbovo, kies nomo en fenika lingvo estis eble kiel »alef«. El fenika alfabeto devenas ceteraj aliaj alfabetoj, precipe malnova greka alfabeto, kiu estas el Grekuj disvastigita ankaŭ en Italujon. Laŭ grekaj mitoj la konon de skribarto alportis Kadmos, kio estas »viro el Oriento«. Kaj en Italujo ekestis latina alfabeto, kiu disvastiĝis en la romia imperio, sed ne malaperis post ties fino, penetris al mezepokaj nacioj kaj disvastiĝis plu en la nova epoko. La katolika eklezio, kies ofica lingvo restis la latina lingvo eĉ post falo de la romia imperio, disvastiĝis la latinan alfabeton al kristanaj kaj kristanigitaj nacioj kaj la ekspansioj de la blanka raso en komenco de la nova epoko portis la latinan alfabeton pluen, al novaj kaj novaj nacioj. Nun apartenas la latina alfabeto al plej multe disvastigitaj liter sistemoj, kaj kvankam ĝi ne estas ununura liter sistemo de la eŭropa kulturo, tamen ĝi estas unuaranga. Neniu el internaciaj lingvoj (artefaritaj) pripensis eblecon forigi la latinan alfabeton. La unua skribo en la latina alfabeto devenas eble el la jaro 600 a. Kr. Ekde tiu tempo, do 2500 jarojn ekzistas jam latinan alfabeto. Komprenoble ankaŭ ĝi havas sian evoluon, sed tamen la bazo restas sen ŝanĝo. La origina latina alfabeto havis 21 literojn. Unue oni konis nur majusklojn, nur en la mezepoko ekestis ankaŭ minuskloj. Kaj nur ekde la invento de la presarto oni konas presliterojn kaj skribliterojn, do ekzistas kvar tipoj de unu litero: presmajuskla, presminuskla, skribmajuskla, skribminuskla. Komprenoble kiam oni en la mezepoko skribis librojn, do la pentremo de skribistoj alportis diversajn modifojn de la unueca literaro, kiuj kondukis parte al tiuj tipoj, parte al sistemoj, kiujn oni nun eĉ opinias memstaraj. Estas precipe ira, gotika kaj germana liter sistemoj. Kaj post la invento de la presarto ekestis tipoj de presliteroj, pri kiuj oni povas konvinkiĝi kaj ellerni en prospektoj de presejoj.

Adapto de latina alfabeto al naciaj lingvoj

Kiam en la mezepoko komencis la latina lingvo perdi sian gravecon kaj la naciaj lingvoj eniris en la literaturon, do estis necese adapti por tiuj lingvoj la latinan alfabeton. La malnova latina alfabeto havis 21 literojn: A B C D E F H I K L M N O P Q R S T V X Y.

Sed jam en la latina lingvo oni aldonis la literon G, kio estas diferencigo de C kaj estas do preskaŭ same skribita, kaj literon Z, kiun oni bezonis por grekdevenaj vortoj. Sed eblecon pliriĝigi la alfabeton per novaj literoj eluzis la latina alfabeto relative malmulte. Tio estas granda diferenco de la greka alfabeto, kiu disvastiĝis al Rusoj kaj aliaj orientaj nacioj, sed kun multaj aldonitaj literoj. Se oni komparas serban kaj rusan alfabetojn, oni vidas multajn diferencajn literojn. Jam la latina lingvo eluzis zeŭgmon, tio estas kunigo de du literoj, kiun oni legas alie ol unuopajn sonojn. Estas CH, zeŭgmo, kiu devenas jam el la latina lingvo, en kiu oni C legis kiel K, do estas fakte KH. La mezepokaj naciaj lingvoj, kiuj en granda parto havis pli multe da sonoj ol la latina lingvo, transiris ankaŭ al similaj zeŭgmoj, per kiuj ili notis sonojn, kiuj ekzistis en ilia lingvo kaj ne estis en la latina alfabeto. Kompreneble tio okazis jam post la etapo de la primitiva ortografio, kiu sufiĉis por skribi nur nacilingvajn glosojn en latinaj tekstoj. Diversaj lingvoj havas en siaj ortografioj diversajn zeugmojn, kiuj komence eĉ ne estis unuecaj kaj nur malrapide stabiliĝis. Krom zeŭgmoj oni povas enkonduki novajn literojn per diakritikaj signoj, kiuj estas ĉe la litero super-, sub- aŭ enskribitaj. La plimulto da lingvoj uzas ambaŭ eblecojn, jen zeŭgmoj, jen diakritikaj signoj estas pli oftaj. Do ekzemple slavaj lingvoj havas plurajn literojn kun diakritikaj signoj, kontraŭe la angla lingvo uzas nur 26 literojn de la latina alfabeto. Do ĝi uzas nur novajn literojn J, U, W, kiuj ekestis en la latina alfabeto nur dum la mezepoko. Sed ĝi bezonas multajn zeŭgmojn. Plej multe da diskritikaj signoj havas kelkaj afrikaj kaj aziaj lingvoj, ekzemple la vietnama lingvo. La diakritikaj signoj sub la litero estas ekzemple en la franca kaj rumana lingvoj: ç, ș. En la litero estas ekzemple en pola lingvo ten kroata linvo Đ, en dana lingvo Ø kaj aliaj. Kelkaj lingvoj skribas siajn zeŭgmojn tiel tuŝe, ke ekestas kvazaŭ novaj literoj, ekzemple en germana lingvo ß, en franca lingvo œ kaj simile.

La 26 latinaj literoj kompreneble havas en diversaj lingvoj alian validon, kiu ja povas esti sufiĉe diferenca de la origina latina prononcado, pri kiu oni ja ne scias precize, ĉar la nuna prononcado de la latina lingvo, kiu ja ne estas unueca, devenas el la imperiestra epoko. Sed ekzistas sistemoj, kiuj strebas signi ĉiujn diversajn sonojn kaj kiuj estas, uzataj por skribi novajn nekonatajn unue aŭditajn lingvojn. Ofte tiuj sistemoj poste iĝas bazo de la kulturo de koncerna nacio. La brita biblia asocio presas unue la biblion en la koncerna lingvo kaj poste eble la latina alfabeto iĝas ilo, per kiu tiu nacio partoprenas la homaran kulturon. La nombro da tiuj popoloj kaj nacioj kreskas ĉiutage.

656.02:656.13

KALKULADO DE VOJTRAFIKA INTENSECO BAZITA JE AŬTONOMBRO KAJ DISTANCO DE URBO

(Miroslaw Kossakowski, Varsovio, Pollando)

1. Principo de la metodo

Multaj metodoj ekzistas por determini la nombron da cirkulantaj aŭtomobiloj sur ŝoseo kaj inter ili speciale praktika estas la matematika formulo bazita je aŭtonombro kaj distanco de urboj.

Laŭ tiu metodo oni povas konstati la tagnoktan veturanton, sciante nur nombron de aŭtomobiloj registrataj en urboj kaj la interspacon de pristudataj urboj.

2. La matematika formulo

Vojtrafikan intensecon oni povas kalkuli laŭ la jena formulo:

$$V = K \sqrt{Z_a} \sqrt{Z_b}$$

kie:

V — vojtrafika intenseco, t. e. la nombro de aŭtoveturiloj trapasantaj vojsegmenton en du direktoj, dum unu diurno (24 horoj),

Z_a, Z_b — nombro de aŭtoveturiloj, registrataj en loĝloko A kaj B,

K — koeficiento, determinita laŭ empiria metodo. Konforme al F. Vomberg («Strassen und Tiefbau» nro 4—1958), la koeficiento K havas la sekvantan difinon:

$$K = \frac{1g(D + 1,3)}{D^2} \left(188,8 - \frac{1416}{D + 7,13} \right)$$

kie: D — distanco inter la centroj de urboj A kaj B, en kilometroj.

3. La ekzemploj de aplikado

La plej simpla apliko de la formulo povas esti ilustrita per la jena ekzemplo (fig. 1):

Ekzistas tri loĝlokoj A, B kaj C kun registritaj aŭtoveturiloj $Z_a = 5000$ aŭtoj, $Z_b = 600$ aŭtoj, $Z_c = 300$ aŭtoj. La distanco inter la loko A kaj B egalas 6 kilometrojn, kaj inter A kaj C estas 10 kilo-